



MARTINUS  
INSTITUT

# Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

**Martinus:**

Gardanĝeloj en la  
servo de la nacio

**Andreas Künzli:**

Zamenhof-jaro 2009

**Ivo Lapenna:**

La grandeco de D-ro  
L.L. Zamenhof

**Betty Chatterjee:**

Marie Schrøder

**Ileana Schrøder:**

Frederik de Skeel-  
Giørling

**Betty Chatterjee:**

Margrethe Noll

**Erik Gerner**

**Larsson:**

Martinus 2  
Mallonga biografio

**Erik Gerner**

**Larsson:**

Martinus 3  
La Travivaĵo

**Ole Therkelsen:**

100-jara datreveno  
de Ivo Lapenna



En julio 2009 okaze de la 150-jariĝo de la naskiĝo de Zamenhof la 94-a Unversala Kongreso okazis en la naskiĝurbo Bjalistoko. En 2010 la 95-a UK okazos en Havano, Kubo, kaj en 2011 la 96-a UK okazos en Kopenhago.

Andreas Künzli, Svisio, skribas pri la Zamenhof-jaro 2009. En ĉi tiu numero vi ankaŭ povas legi pri la interna ideo en "La grandeco de Zamenhof" verkita de Ivo Lapenna antaŭ 50 jaroj en 1959 okaze de la 100-jara jubileo de la naskiĝo de Zamenhof. Interese estas, ke ĉi jare oni povas ankaŭ celebri la 100-jariĝon de la naskiĝo de Ivo Lapenna. Iam Martinus (1890-1981) estis fotita kune kun Ivo Lapenna (1909-1987) en Restoracio Lorry nur 2 kilometrojn for de la Martinus-Instituto.

2009 ankaŭ reprezentas la 100-jariĝon por la subita kaj ŝoka forpaso de la dana esperanta pioniro Marie Schrøder. En ĉi tiu numero vi trovos du artikolojn de Betty Chatterjee, unue pri Marie Schrøder (1882-1909) kaj due pri alia dana pioniro Margrethe Noll (1874-1962). La nuna deligenta estro de DEA (Dana Esperanto-Asocio), Ileana Schrøder, kiu ankaŭ kiel Ivo Lapenna naskiĝis en Kroatio, verkis alian intere-

san artikolon pri la dana pioniro Frederik de Skeel-Gjørting (1876-1910), kiu antaŭ 99 jaroj ankaŭ june forpasis kiel Marie Schrøder. Zamenhof nur vizitis Danion unu fojon, nome post la UK en Dresdno 1908. Dum la postkongreso en Kopenhago Ludoviko kun edzino Klara estis fotita en la unua vico kune kun Marie Schrøder kaj Skeel-Gjørting.

En januaro 1939, nun antaŭ 70 jaroj, en Kosmos n-ro 1/1939, Martinus en dana lingvo skribis pri esperanto. Dum la tuta jaro en 12 numeroj Erik Gerner Larsson aperigis artikolon en esperanto, kaj en ĉi tiu numero vi trovos la 2-an kaj 3-an, "Mallonga biografio" kaj "La travivaĵo", tradukita en 1939 fakte de la patrino de la dana movado Margrethe Noll. Libroŝranko de Noll hodiaŭ plene de esperanto-libroj troviĝas en studĉambro n-ro 6 en Martinus-Centro, Klint.

Laŭ internacia kaj tergloba vidpunkto la enhavo de la unua artikolo "Gardanĝoj en la servo de la nacio" de Martinus estas tre interesa.

En 2010 estos neniuj E-semajno en Klint, sed estos post la kopanhaga UK komence de aŭgusto 2011.

*Ole Therkelsen*




La ligna domo numero 6 en la Ulica Zielona en Bjalistoko



La familio Zamenhof loĝis en la Ulica Zielona 6. Ulica Zielona = Verda strato

# Gardanĝeloj en la servo de la nacio

de Martinus



## 1. Spiritaj kaj fizikaj estuloj

Flanke de la videblaj vivaj estuloj en la fizika sfero ekzistas tuta serio da nevideblaj vivaj estuloj. Tial ni pri tiuj estuloj diras, ke ili vivas en alia sfero, la tiel nomata “spirita sfero”. Tial ni nomas tiujn estulojn “spiritoj”. La diferenco inter tiuj spiritaj estuloj kaj la fizikaj estuloj estas, ke la fizikaj estuloj estas ligitaj al kombino de diversaj solidaj kaj likvaj materioj en formo de fizika organismo, dum la spiritaj estuloj ne plu havas tian organismon. Sed absolute ĉiuj ekzistantaj spiritoj antaŭ pli aŭ malpli longa tempo havis fizikan organismon. Neniu estulo povas esti spirito, povas esti viva estulo sen enkarniĝo en fizika materio, same kiel neniu ajn estulo povas esti fizika estulo sen, ke ĝi malantaŭ la fizika organismo ekzistas kiel “spirito”.

## 2. La spirito en la organfunkcioj de la universo

Se ni rigardas fizikan organismon, ĝi montriĝas kiel iaspeca universo. Same kiel la granda universo enhavas multajn diversspecajn fenomenojn, planedojn, sunojn, galaksiojn kun miriadoj da diversaj formoj de movo, kiu estas esprimo de logika kreado kaj per tio esprimo de vivo kaj konscio, de penso kaj volo, sekve la fizika organismo de la viva estulo ankaŭ enhavas serion da fenomenoj, kiuj ĉiuj kreas siajn formojn de logikaj aŭ utilaj specoj de movo kaj per tio esprimas vivon, konscion,

person kaj volon. En la konataj organismoj de vivaj estuloj, kio signifas la estuloj en “mezkosmo”, ni ne kutimas nomi tiujn fenomenojn sunoj kaj galaksioj, sed ni konas ilin kiel organojn kaj organfunkciojn. Tial nia korfunkcio, pulmfunkcio, glandofunkcio kaj simile estas logikaj procezoj en la organismo, sen kiuj tiu ne povus pluekzisti aŭ esti tiu ilo por ni, kiu ĝi necese estu, por ke ni povu travivi la vivon en la fizika sfero sub tiu formo, kiu dum nia nuna evoluo- kaj sortoepoko estas vivkondiĉa por ni. Sed estus stulte kredi, ke ĉiuj grandaj fenomenoj ekstere en la universo, la procesoj de moviĝo de la naturo, ne same estas funkcio de organoj en granda organismo. Kio tio estus alie? – Kiam ĉiuj materikombinoj, kiujn ni kapablas kompreni per nia konscio, ne povas ekzisti sen esti organ- aŭ konscifunkcioj, kun kiu rajto aŭ sur kiu fundamento ni devus akcepti, ke la movspecoj ne havas la saman logikan celon en la grandaj materiokombinoj kaj movospecoj, kiujn ni per niaj fizikaj sensiloj povas trarigardi, kiujn ni ĝuste nomas la naturo, la stela mondo kaj galaksioj? –

Ĉu ne jam antaŭlonge fariĝis fakto, ke nia tuta fizika vivo ĉi tie sur la tero estas tute kreita per kunlaboro inter la suno kaj nia tero? – Kiel tiu vivo kaj tiu apero, kiun ni nun reprezentas, povus esti kreita kaj konservita sen la lumo kaj varmo de la suno? – La tero hodiaŭ estus glacia dezerto envolvita en la plej

malluma nokto, sfero de purgatorio por provizore perditaj animoj. Sed kiam tiuj planedoj kaj steloj, sunoj kaj galaksioj tiel kreas tiujn necesajn kondiĉojn por la vivo, tiuj ja ankaŭ estas organfunkcioj. Kaj kial ili ne estus tiaj? – Estus nelogike kaj plej altgrade stulte kredi, ke la kolosaj fortoj, kiujn la sunoj kaj galaksioj reprezentas, dum milionoj kaj denove milionoj da jaroj devus ŝvebi tra la grandega spaco sen iu ajn utilo, kiam ni ĉi tie sur la tero ne povas preni guton da marĉakvo, sen ke ĝi estu tutplena de vivformoj. Kial tia abundo de vivo en malgranda guto se la planedoj, sunoj kaj galaksioj de la universo tiel multoblaj, ja nenombreblaj kiel la sableroj ĉe la marbordo, estus nelogataj de fizikaj estuloj, estus nelogataj de spiritoj aŭ de psikaj vivformoj?

### **3. La mio kaj la spirito malantaŭ la organismo**

La venonta vera kaj plej altranga scienco fariĝos la scienco pri la psika aŭ spirita flanko de la vivo mem. Tial oni spertos, ke la tuta universo estas traradiata de spirito, kiu ja estas la samo kiel vivo kaj konscio kaj sekve de penso kaj volo, avido kaj kontentiĝo de avido. Oni spertos, ke ne estas la vivo, kiu estas kunligita kun la fizika organismo, sed nepre estas inverse. Estas la fizika organismo, kiu estas ligita al la vivo. La vivo en si mem estas eterna, dum la organismo kun ĝiaj specialaj fenomenoj nur estas provizora, nur estas portempa. Kaj de nia propra vivfunkcio ni ja konas, kiel ni per propra penso kaj volo regas nian manifestadon kaj nian fizikan korpon. Ke ne estas la cerbo, kiu prizorgas tiun regadon, ĉiu honesta, intelekta, kosma esploristo scias. Tut certe la cerbo estas la granda ĉefilo, la granda sendilo kaj ricevilo de la forto de la volo. Tiu do nur estas ilo, sed por kiu? – Jes, iu fizika estulo ne povas esti, ĉar ĉio, kio alie ekzistas en tiu ĉi organismo, same nur estas subordigitaj iloj

por la sama reganta io. Tiu io do estas la estiganto de la organismo. Sed ĉar tio ĉi ne ekzistas en la fizika sfero, sekve do estas psika estulo, kio estas la samo kiel "spirito". Malantaŭ ĉiu fizika organismo, ĉu planedo aŭ astro, ĉu ordinare konata organismo de karno kaj sango, ekzistas do reganta spirito. Kaj sekve malantaŭ la fizika apero de la terglobo ekzistas reganta spirito, kiu estas la plej alta aŭtoritato de la tuta terglobo. Sed spirito ne nur konsistas el spirito. Spirito laŭlitere estas penso kaj volo, kiu denove estas la samo kiel konscio, kaj konscio estas siavice io kio estas subordigita de estiganto, pro tio ke ĝi estas spertata kaj manifestata. Tiu ĉi spertanta kaj manifestanta io estas tio, kion ni lernis rekoni kiel la mio. La mio kombinita kun penso kaj volo aŭ konscio konsistigas spiriton, kiu alivorte estas viva psika estulo.

### **4. Diktaturo en kontakto kun la konscio, avido kaj volo de la termio**

La plej alta aŭtoritato en la regiono de la tero sekve estas la mio de la terglobo. Ĉiuj aliaj potencfaktoroj en ĝia regiono, kiel la konataj grandpotencaj nacioj, sekve ne estas la plej alta aŭtoritato sur la tero. La tergloba mio kun sia spirito estas la absolute suverena aŭ reala reĝo de la tuta terglobo. Ĉu grandpotenca nacio falu, aŭ ĉu ĝi kresku, ĉu raso evoluu en iu aŭ alia direkto, ĉu landlimoj estu tie aŭ ĉi tie, ĉu la nacioj unuiĝu al unu mondo, aŭ ĉu ili restu dividitaj en kontraŭaj ŝtatoj kaj per tio estu daŭra fonto de milito kaj malpaco inter la homoj, tio estas demando, kiu sole povas esti solvita de la vera reĝo de la tero, la spirito de la tero aŭ la termio. Kaj fakte estis tiu ĉi mio de la tero aŭ la spirito de la tero kiu en la pratempo okupis la diktaturajn reĝojn. Kiam oni diris, ke ili estas filoj de Dio aŭ parencoj de Dio mem, reale estis la spirito de la tero, kiu estis plej proksima al ili. Ili tiel estis centroj de la fizikaj talentokerno

de la tero. Per tiuj reĝoj la termio povis reguligi siajn mikroestulojn, kio ĉi tie signifas la fizikan kaj spiritan direkton de la homaro. Per tiuj talentokernoj la termio elsendis sian volon, kiu per la menciitaj kernoj estis transformitaj al organizanta diktaturo. La reĝa estulo ja diferencis de la ordinaraj estuloj per tio, ke li estis “inicita” estulo, kio signifas estulon kun tiom progresinta evoluo, ke la termio povis sendi sian volforton rekte tra tiu estulo. La diktaturo kiu tiamaniere estis praktikata altgrade estis en kontakto kun la volo, avido kaj sopiroj de la termio. La ceteraj homoj en tiu regno, kiu estis subordigitaj de la reĝoj, ja estis nesciantaj estuloj, kiuj ne povis rekte ricevi altajn spiritajn impulsojn de la spirito de la termio. Tial ili nur povis esti organizitaj kaj metitaj en evoluo per la intelekta diktaturo. La reĝoj tiel estis la solaj estuloj kun psiko, kiu rekte povis ricevi la impulsojn de la termio.

Sed iom post iom la mikroindividuoj de la tera spirito fariĝis pli kaj pli evoluintaj, komencis esti intelektaj, kaj la homoj komencis esti kunpensantaj kaj ekhavis la samajn kapablojn kiel la reĝoj. Tiel ankaŭ ili estiĝis talentokernoj por avido, konscio kaj volo de la tera termio. Sed kiam la unuopaj estuloj tiel pli kaj pli evoluis kaj komencis mem pripensi, ekhavis novajn pensojn, kiuj kelkfoje estis pli progresintajn ol tiuj de la reĝo, tiam la diktaturo aŭ la reĝa potenco komencis esti sentata kiel kaptanta ligilo. Estiĝis malobeado kaj ribelado kontraŭ la reĝopotenco. Revolucioj aŭ provoj forigi la reĝopotencan avantaĝe al aliaj formoj de regado komenciĝis. Sed samtempe kiam la estuloj tiel unu post la alia akiris pli da konscio, tiam estiĝis ankaŭ rivaleco pri la reĝa potenco. Gloramo kaj potencavido ja estas la unua, kiu manifestiĝas, kiam la primitiva homo komencas ekhavi kulturalan evoluon. Ĉiuj volas esti malgranda reĝo, por ne diri malgranda

dio. Kaj sekve aperis laŭ la evoluo pli kaj pli da maltrankvilo inter la terhomoj aŭ la plej altrangaj mikroindividuoj de la terospirito. Ni ja vidis, kiel tiu evoluo daŭre okazis tra jarcentoj kaj kreis pli kaj pli grandan malpacon, kaj samtempe la estuloj progresis rilate al teknika kaj kemia scio kaj kapablo.

## **5. Kial la termio permesas militojn kaj revoluciojn**

Nun oni eble demandas: kial la termio ne agas kaj malebligas tiujn militojn kaj revoluciojn? – Kial ĝi ne haltigas tian tutan kataklismon en ĝia propra organismo? – La respondo ĉi tie estas tiu, ke ĝi vere agas por reordigi sian organismon. Ja tre klare videblas, kiel ĝia penso kaj volo okupas la plej eminentajn talentokernojn por ĝiaj impulsoj. Ni hodiaŭ vidas kelkajn estulojn, kiuj ricevis potencon, kiu neniam antaŭe estis donita al iu unuopa estulo sur la globo. Ĉu ni ne hodiaŭ vidas kelkajn unuopajn estulojn, por ne diri unuopa viro, kiu regas cent milionojn da homoj tute diktature? – Kaj ĉu ne tra la propagando kaj agitado ĉirkaŭe en la landoj, aspektas tiel, ke la celo de tiu diktaturo ne estas malpli ol la regado de la tuta mondo? – Flanke de tiu potencgrupo ekzistas alia potencgrupo, kiu ankaŭ alcelas unuiĝon de ĉiuj popoloj sur la tero al *unu* popolo, al *unu* regno kaj *unu* mondo. Sed ĉi tie ne estas la diktatura principo, kie la individuo estas sklavo, kiu estas la celo. Ĉi tie estas formo de regado, en kiu ĉiuj povas partopreni, formo de regado, en kiu ne nur ĉiu havas voĉrajton, sed ankaŭ la rajton kritiki tiel, ke eventualaj maljustecoj aŭ misago de la registaro povas esti publikigitaj kaj konfirmitaj kaj per tio kontraŭbatalitaj. Ĉi tiuj du tendencoj tiom disvastiĝis, ke ili nun koncentras la homojn en du grandaj grupoj, la unua por diktaturo kaj per tio por forrabi la liberecon de la homoj avantaĝe al la potenculoj, kaj la alia por demokratio kaj per tio por la



plej granda protekto de la libereco de la individuo avantaĝe al intelekta evoluo kaj kreado de kulturo. Sekve la homaro hodiaŭ estas dividitaj en du kontrastaj grupoj, kio necese ŝargas la atmosferon kun streĉo, timo de milito kaj fortegaj esprimoj de interna opozicio kaj netoleremo. Kaj ĉar la homoj ordinare tute ne komprenas, kio okazas, ili supozas, ke estas tiu aŭ tiu diktatoro aŭ tiu aŭ tiu eminenta demokrato, kiu kaŭzas la situaciojn. Kaj oni do juĝas laŭ tio. Ĉu ne laŭ tio oni juĝis Lenin, Stalin, Hitler kaj Mussolini, kaj ĉu ne laŭ tio oni juĝas Roosevelt kaj Truman? – Ĉu ne oni opinias, ke estas tiuj homoj, kiuj decidis aŭ decidis la evoluon de la mondo? – Sed io pli naiva ne estas imagebla. Ili ne havas la plej malgrandan influon de la sorto de la homaro. Tio estas io por si mem. Se ne tiuj homoj estus en la fronto de la specialaj fortoj, tuj estus aliaj kun precize sama psiko aŭ tipo de menso. La okazinta situacio estis kaj estas tute neevitebla. La menciitaj estuloj nur estas talentokerno por la konsciimpulsoj de la termio. Ĉar ja estas la sama mio, la sama estulo, la sama reĝo malantaŭ la du kontraŭaj potencgrupoj, kiuj hodiaŭ aspektas tiom minace por la monda paco, nome la termio aŭ la spirito de la tero. Tio estas la volimpulsoj de la terglobo, ĝia moralserĉado, ĝia pensado antaŭen kaj reen pri tio, kion ĝi devas kaj ne devas fari.

## **6. La tero konfrontas sin mem kun sia pensomondo kaj morala sinteno**

Kiel eblas, ke la tero havas tiajn du ŝajne ĉiondetruantajn kontraŭajn impulsojn? – Jes, kial ĝi ne kiel ĉiu alia viva estulo devus stari antaŭ la du grandaj kontrastoj. Tio, kion ĝi scias kaj tio, kion ĝi ne scias. La tera spirito ja estas viva estulo, kiu estas submetita al la spiralciklo, kaj sekve situas en ia loko en tiu ciklo. Kaj ne estas malfacile vidi, ke ĝi troviĝas sur la sama loko

kiel la progresanta ordinara tera homo en sia spiralo, kio ja estas sur la limo inter “besto” kaj homo, kio same estas sur la limo inter egoismo kaj altruismo, inter amo al si mem kaj amo al la proksimulo. Kiam ĝi situas en tiu sfero en sia spiralciklo, ĝia konscio parte estas influata de bestaj aŭ egoismaj pensoklimatoj aŭ spiritaj fortoj kaj parte de la fortoj de humaneco kaj spiritaj fortoj de la amo al la proksimulo. Kiam ĝia konscio estas trafluata de tiaj fortoj, tiam la samaj fortoj memkompreneble kontrolas la konformajn talentokernojn. Kaj sekve oni do fariĝas okupata de la egoismaj aŭ bestaj spiritfortoj de la termio samgrade, kiel oni mem estas egoisma kaj potencavida kaj malama rilate al la proksimulo, sammaniere kiel oni fariĝas okupata de la altruisma humana aŭ amoplena tendenco aŭ energio de la termio samgrade, kiel oni estas taŭga talentokerno por tiuj fortoj. Sekve ni vidas, ke la “grandaj viroj” en la mondpolitiko reale nur estas okupitaj de la impulsoj de la termio de tiu speco, kun kiuj ili mem plej multe simpatias dum sia ĉiutaga vivo. Sed kiam en la terpsiko aŭ termenso tiel aperas du kontraŭaj fortoj, kiuj persekutas unu la alian, tio do signifas, ke la tera spirito estas esploranta sin mem, sian propran pensomondon, sian moralan sintenon. Kaj dum tiu esplorado estas klare, ke ĝi kolektas ĉion, kio povas paroli por la egoismo kaj la diktaturo aŭ forrabo de la libereco de la unuopa individuo avantaĝe al la amaso, same kiel ĝi kompreneble volas kolekti ĉion, kio parolas avantaĝe por la libereco kaj protekto de la unuopa individuo kontraŭ la amaso aŭ la ŝtato, protekto kaj vastigo de la amo al la proksimulo. Tiel la tero momente pripensas. Ĉar ĝi estas de tute alia tempociklo ol la mikrociklo, en kiu ni mem vivas, ĝia “pensotempo” estas multe pli longa tempospaco ol la nia. Kio estas sekundo por la terestulo, tio

eble estas jaro aŭ dek jaroj aŭ jarcento por ni. Tial ni komprenas, kaj la pensfunkcioj de la tero, ĝiaj ŝanĝantaj sintenoj, trapasas la homaron kiel ties kulturepokoj. La tero do estas en krizo, nepre tiu krizo kiu ĉiam antaŭeniras la iniciĝon. La terglobo komencis la spiritan proceson jam antaŭ jarcentoj kaj estos preta post tri mil jaroj, do ne estas strange, ke ni sentas tiujn ĝiajn konsciimpulsojn tiom forte en nia propra sfero, ĉar ĝi ja estas okupita de la spirito de la tero.

Per tiu mapado de la terhoma psika sfero ne estas malfacile eltrovi, kio venkos en la mondo. Ĉar la reĝopotenco aŭ la moderna diktaturo, la manko de amo kaj la forrabo de la libereco estas

io, kio jam estas elĉerpita, ĝi falos kiel tiu velkinta kulturepoko, kiu ĝi reale estas, kaj venkos la novaj demokrataj impulsoj. Pli kaj pli da homoj aŭ talentokerno por tiuj impulsoj estos okupataj de la plej altaj konsciimpulsoj de la terospirito, kiuj estos manifestitaj per vortoj kaj agoj en la materia sfero. Estas talentokerno de tiu speco, kiujn ni konas kiel mondliberigantojn, la grandajn humanistojn kaj kulturkreantojn, kio prenos formon kiel spirita scienco.

*La dana titolo: "Skytsengle i nationens tjeneste" (03.04.1949). Dana Kosmos, n-ro 1/1998. Esperantigita de Ejnar Langkilde kaj Hokan Lundberg.*



### En Restoracio Lorry, Pile Allé 7, DK-2000 Frederiksberg

Maldekstre sidas Mischa Lim (n. 1937), Eva Gentsch, Sam Zinglersen (1912-2007), meze Peter Zacho (1911-1991), dekstre Birthe Zacho Lapenna (n. 1935), Ivo Lapenna (1909-1987) kaj Martinus (1890-1981). Fotita iam en la periodo 1976-1979. En oktobro 1961 Martinus kune kun Sam kaj Peter vojaĝis al Egiptio kaj Israelo. Verŝajne ĉi tiu estas la sola foto, kiu montras Ivo Lapenna kaj Martinus kune. Ofte amikoj inter aliaj Sam Zinglersen kaj Peter Zacho invitis Martinus iri al kinejo por vidi distran filmon aŭ komforte manĝi en restoracio. Hodiaŭ sur la adreso Pile Allé 7 ne plu estas restoracio, sed televida kompanio TV2-Lorry.

# Neutrala lingvo kaj nova humanisma etiko

de Andreas Künzli, Svislando

## La celado de d-ro L.L. Zamenhof

Esperanto, homaranismo kaj cionismo nomiĝas la tri premisoj, sur kiuj baziĝis la tuta pensado, verkado kaj laborado de d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917). Eblas kronologie inversigi la vicon de tiuj tri pilieroj laŭ disponebla prioritato ĉe Zamenhof, kiu alterne okupiĝis pri ili, foje pli intense, foje malpli. Certe oni povas ankaŭ uzi sinonimojn: Esperanto estas la vivanta simbolo de la internacia neŭtrala planlingvo, la homaranismo esprimas novtipan humanisman etikon en la mondo, la cionismo klopodis solvi la problemojn de unuopa etno, do de la hebreoj aŭ judoj, al kiuj Zamenhof apartenis. Ĉe L.L. Zamenhof ĉiuj tri temoj estis intime kaj nedisigeble interligitaj. Ekskludi unu el ili, ekzemple la judan fonon de Zamenhof, do simple ne eblas, ĉu tio plaĉas aŭ ne. Nature, la Esperanto-movado elektis kaj popularigis nur la ideon de la neŭtrala lingvo, ĉar ĝi konsideras sin movado ne religieca, sed internacilingva (aŭ planlingva), dum la homaranismo kiel dubinda doktrino, ĉar konsiderata kiel tro utopia, estis maksimume efektivebla kiel ,interna ideo' de la ,esperantismo' kun la kerna signifo de solidareco kaj amikeco inter la popoloj. Pri la cionismo Zamenhof rezignis, kaj li lasis al aliaj la taskon efektiviĝi ĝin. En la Esperanto-propagando la juda deveno de Zamenhof estis longe prisilencita, eĉ en la Enciklopedio de Esperanto (1934). Ĉi tiun neceson evidente diktis la cirkonstancoj de konkreta historia periodo. Ĉar en la vivotempo de Zamenhof – kaj ankaŭ poste – la antisemitismo estis integra elemento de politikaj reĝimoj de diversaj ŝtatoj, de Francio kaj Germanio

ĝis Pollando kaj Ruslando. Preskaŭ ne ni nuntempa esperantisto, krom se li aŭ ŝi estas informita, konscias, ke Zamenhof origine celis krei neŭtralan lingvon ekskluzive por sia propra gento vivanta en la diasporo, aŭ ke la lingvo Esperanto estis nur parto de la ,granda ideo' de la projekto, kiun Zamenhof nomis homaranismo (pli frue hilelismo), kiu siaflanke sen la juda sav-ideo ankaŭ ne estas pensebla. Feliĉe, kelkaj esperantologoj denove dediĉas atenton al tiu grava temo. Kaj anstataŭ prihonti aŭ kaŝi la judecon de Zamenhof, ni povas hodiaŭ fieri pri tiu heredaĵo, sendepende de tio, ĉu ni estas kristanoj, ateistoj, sennaciuloj, aŭ io alia aŭ judoj mem.

## Zamenhof ne estis polo

Iom post iom, kaj certe fine de sia vivo, Zamenhof ,abdikis' je ĉia politika ŝovinismo kaj genta patriotismo (li eĉ ne plu volis aliĝi al la hebrea Esperanto-asocio) por deklari kaj proklami sin mem kiel ,homaronon', havante la deziron esti nur ,homo'.

Lige kun la ĝis nun emfazita ankoraŭ unu mito, kiu obstine kaj persiste konserviĝas erare kiel vero en la konscio de parto de la esperantistaro, eĉ klera kaj informita, devas esti traktita – kaj rifuzita. Zamenhof *ne* estis polo! Same kiel li ne estis ruso aŭ litovo aŭ israelano aŭ kio ajn ankoraŭ. Laŭ la fontoj, kiujn ni posedas, Zamenhof nomis sin „ruslanda hebreo“ aŭ judo (ruslingve: russkij evrej), kaj (la historian) „Litovujon“ li konsideris kiel sian patrujon, hejmlandon, do ne Pollandon. Kiam Zamenhof vivis en Varsovio, certe la pola lingvo ricevis pli fortan signifon



en lia ĉiutago, kiel li skribis al siaj korespondantoj, sed tiu lingvo estis de li uzata nur inter aliaj, ĉar la originaj etnolingvoj por li estis kaj restis la rusa kaj la jida. Polan identecon li decide rifuzis en siaj leteroj, kaj fakte nenie en la verkaro de Zamenhof estas trovebla emfazo pri lia eventuala poleco. Krom lia kono de la pola lingvo kaj ke li loĝis en Varsovio, Zamenhof havis do nenion komunan kun la poleco. Do lia laŭdira poleco estas speco de invento, kiun oni poste altrudis al li interalie por kaŝi lian judecon. Zamenhof kaj lia familio devenis de la lit(v)aj judoj (t.n. litvakoj), kiuj aplikis ĉefe la rusan (kaj jidan) lingvon. La litvakoj estis specifa branĉo de la orienteŭropa (aŝkenaza) judaro, kun tre komplikaj etna aŭ genta kaj lingva identecoj. Necesas do tre klare scii, kiaj komprenoj (ĝenerale kaj laŭ Zamenhof) kaŝiĝas malantaŭ tiuj terminoj por ne veni al maladekvataj interpretoj kaj konkludoj. Paradoksoj en la identeco de orienteŭropaj homoj estis normala afero. Estus do bone, se la esperantistoj revizius sian tradicie falsan bildon pri la ,polo' Zamenhof. Samtempe necesas konsideri, ke Zamenhof ankaŭ ne estis filologo (nu, iusence eble nur hobia).

### **Blankaj makuloj en la biografio de Zamenhof**

Efektive, la kompreno de la ideologio de Zamenhof pretigas al ni kelkajn problemojn, ĉar ĝi ne estas libera de nebulaj momentoj kaj internaj kontraŭdiroj. Ankaŭ en la biografio mem de Zamenhof troviĝas multaj epizodoj, kiuj ĝis hodiaŭ ne estas klarigitaj – ekzemple kiujn gravajn verkojn Zamenhof konis, kion Ludoviko vere travivis en Bjalistoko, kion li efektive faris en Moskvo krom la studado kaj kial li anticipe forlasis ĝin, kio vere okazis lige kun la bruligo de lia lingvomanuskripto, ĉu la Zamenhofoj vere manĝis ŝinkon, ĉu Zamenhof estis bona okulkuracisto aŭ ne, kiun veran rolon ludis liaj gepatroj, la bopatro Zilbernik

kaj liaj aliaj parencoj, kiujn literaturajn modelojn Zamenhof uzis por siaj beletraj tradukoj, ktp. Pri amaseto da eroj de liaj vivo kaj laborado ni estas daŭre malbone informitaj, kaj ni emas kredi la mitojn kaj legendojn, kiujn surtabligis al ni diversaj biografoj – de Privat ĝis Centassi/Masson (sendepende de la nobleco de ilia biografia laboro). La tasko de la esperantologoj kaj ,zamenhofologoj' estus provi ekscii iom pli, ion novan rilate al ĉiuj tiuj demandoj.

### **Riĉa heredaĵo esplorinda**

Kiel oni povas imagi, la zamenhofsia heredaĵo estas riĉa kaj multfaceta kaj donas multajn okazojn por scienca esplorado. La analizado de la fenomenoj laŭ sektemaj manieroj ,finvenkisma' aŭ ,raŭmisma' jam estis farata kaj ne plu taŭgas. Ni ne plu praktiku fantaziologion kaj metafizikon diverstipajn, sed apliku novan realismon, laŭ modernaj sciencaj normoj kaj kriterioj. La fakuloj de la lingvistiko, socilingvistiko, lingvosociologio, lingvofilozofio, historiografio, politologio, etnografio, teologio, hebreditiko/judistiko kaj de aliaj fakoj kiel kibernetiko, hermeneŭtiko kaj kompreneble interlingvistiko estas alparolataj. Sed ekzistas ankoraŭ aliaj dimensioj en la zamenhofsia filozofio, kiuj indas je konsiderado, eĉ se la homaranismo aŭ la judeco de Zamenhof ŝajne ne ludas tioman rolon. Mi pensas unuavice al liaj diversaj rimarkindaj traktaĵoj kiel *Esperanto kaj Volapük* (1889/90), *Esenco kaj estonteco* (1900), *Gentoj kaj Lingvo Internacia* (1911), *Post la Granda Milito* (1915), kie lingvoetikaj, lingvofilozofiaj, lingvoteoriaj kaj lingvopolitikaj aspektoj ludas pli gravan rolon. Ĉi tiujn tekstojn necesus nove legi, nove analizi kaj nove priskribi laŭ moderna lingvaĵo por povi taksii ilian signifon kaj por la tiama epoko kaj eble ankaŭ por la nuntempo.

Ne plej laste en la vico de la zamenhofsia verkaro elstaras la grandiozaj paroladoj, kiujn li prezentis okaze de

la Universalaj Kongresoj de Esperanto, precipe en Bulonjo, Ĝenevo, Kembriĝo/Londono, Vaŝingtono, ktp. Ĉi tiuj tekstoj ne nur signifas konsiderindajn ekzemplojn de kulmina retoriko en Esperanto, sed ili entenas praktike ĉion ideo esencan, kion Zamenhof volis mesaĝi. Certe, tiuj paroladoj entenas multajn kuriozaĵojn kaj respegulas unuavice la personajn vidpunktojn de Zamenhof, ligitajn kun la homaranisma projekto kaj kun kelkaj aktualaj okazaĵoj. Ĉu dum tiuj paroladoj Zamenhof estus povinta aŭ devinta elekti aliajn pli adekvatajn temojn? Oni almenaŭ rajtas starigi tiun demandon. Kiel sciante, al Zamenhof oni malpermesis diri publike pri interfratiĝo inter diversaj religioj kaj pri homaranismo, tiel ke tiuj neeldiritaj partoj kaptas la atenton de la historiistoj ĝis nun.

### **Bona faka kono estas postulata**

La traktaĵoj kaj Leteroj de Zamenhof, zorge kolektitaj kaj eldonitaj de Dieterle, Waringhien, Holzhaus kaj Kanzi (ludovikito) kaj laste de Korĵenkov, kiu kompilis kaj prinitis la homaranismajn dokumentojn en tema kaj kronologia kunteksto, disponigas senliman rezervujon de informoj el la zamenhofa tempo. En la leteroj de Zamenhof ofte aperas banalaĵoj, tiel ke eblas bedaŭri, ke Zamenhof ne rakontis pli profunde pri si mem, pri sia ĉiutaga vivo, kion li legis, faris, diris, aŭdis, pensis kaj vidis, kiu vizitis lin kaj kun kiu li parolis pri kio (nu, multegaj leteroj de Zamenhof perdiĝis, kaj ni ne scias, kion li skribis en aliaj leteroj). Por la kompreno de lia ekzistado tiaj informoj estus ege utila provizo. Restas al ni do iel rekrei, restaŭri tiun zamenhofan periodon, kio lasas al ni sufiĉe multe da libera spaco por la interpretado kaj imagado. Klaras, ke por rekonstrui la tiaman realecon necesas bonega faka kono de la kutimoj, moroj, trajtoj, etoso kaj problemoj de la tiam tempo.

Kompreneble oni povas kaj devas daŭre okupiĝadi pri lingvistikaj kaj literatursciencaj demandoj lige kun la

verkaro de Zamenhof, kvankam multo estas jam farita.

### **Deziroj en la jubilea jaro**

Inaŭgure al la nuna jubilea Zamenhof-jaro mi ŝatus esprimi kelkajn dezirojn: La unua koncernas la malnovan (kaj intertempe maljuniĝintan) generacion de esperantologoj, kiu fervore aktivadis en la 1970/80-aj jaroj kadre de unikaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj simpozioj en diversaj landoj, por ke ili retrovu la kuraĝon kaj pluokupiĝu pri esperantologio kaj zamenhofologio.

La dua deziro direktiĝas al novaj publikoj en kaj ekster la Esperanto-movado kun la espero, ke interesataj kaj kapablaj novaj fortoj aliĝu al la laboro cele al la faka esplorado kaj sistema analizado, hermeneŭtika interpretado kaj scienca eldonado de la zamenhofa verkaro por atingi novajn ekkonojn, rezultojn kaj sukcesojn sur tiu ĉi specifa kampo. Sinergie kaj sinteze al ĉiuj tiuj sciencaj kaj popularsciencaj klopodoj necesus entrepreni ĉefan projekton: la verkadon de moderna, ampleksa kaj se eble kompleta bio-bibliografio pri la kreinto de Esperanto kaj de la homaranismo. La historion de la internacia lingvo Esperanto ni ne vidu sen la homaranisma kunteksto, kaj interpretu la zamenhofan postlasaĵon se eble en la kunteksto de lia vivotempo kaj laŭ pli aktualaj kriterioj, ĉar fake necesas adapti sin al la nuntempa realo.

Tre utila, kaj fakte necesa projekto estus la digitaligo de la kompleta zamenhofa verkaro, por pli facile trovi la aferojn per aŭtomata serĉado, eventuale ankaŭ ĝia interretigo, ĉar labori nur surbaze de libroj, parte elĉerpitaj, estas malpraktike, tempoperde kaj multekoste.

Mi estas en la bona kredo, ke konstrui la ponton inter la zamenhofa pensado kaj la moderna tempo eblas, kiel montras la sperto kun la okupiĝado pri homaj kaj lingvaj rajtoj, lingvopolitiko, interlingvistiko kaj simila.

## Notoj

<sup>1</sup> La hilelismo de 1901 devas esti diferencigita de la hilelismo de 1906, ĉar temas pri komplete diversaj konceptoj kaj enhavoj.

<sup>2</sup> Komprenoble, CED/UEA, ESF kaj GIL kaj aliaj organizoj kaj individuoj jam faris multon ĉi-rilate. Ekzemple Korjenkov (kiu eldonis la libron *Mi estas homo*), Künzli kaj Ŝelazny planas la verkadon kaj aperigon de sciencaj Zamenhof-studoj (biografioj); Lins prilaboris la 6an eldonon de *Vivo de Zamenhof* de E. Privat kaj publikigis germanlingvan artikolon pri la cionismo kaj homaranismo de LLZ en la Juda Almanako de la Leo-Baeck-Instituto, kaj Kiselman verkis publikigotan artikolon pri la evoluo de la homaranisma ideo ĉe LLZ, kiu dume atingblas en interreto.

<sup>3</sup> Utilus fari studon, en kiuj publikaĵoj Zamenhof aperas kiel polo kaj esplori la identec-bildon, kiun ekzemple Zakrzewski (1913), Ziółkowska (1959) kaj Kraško (1972) en sia biografioj kaj eble aliaj kiel Pola Radio kreis pri LLZ. La pola (kaj ekzemple ankaŭ la bulgara, slovena franca kaj itala) Vikipedio daŭre prezentas Zamenhofon kiel „polan kuraciston“ (tamen menciante, ke li estis de juda deveno).

<sup>4</sup> De la cara registaro la juda inteligencio, al kiu Zamenhof apartenis, estis konsiderata kiel asimilita al la rusa gento.

<sup>5</sup> Ankaŭ ne helpas interpreti ‚polski‘ kiel ‚pollanda‘, ĉar pola lingvo ne distingas vorte ‚pola‘ de ‚pollandano‘ kiel tion faras la rusa laŭ la modelo ruskij/rossijski.

<sup>6</sup> Kiel tion asertas diversaj nacilingvaj versioj de Vikipedio.

---

## Ĉefaj konsultindaj libroj pri la temo (elektio):

- Vivo de Zamenhof. Edmond Privat. (Red. Ulrich Lins), Rotterdam 2007 (6a eld.).
- Wendy Heller: Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto. Tradukita de Bernhard Westerhoff, Antwerpen 2007.
- Mi estas homo. L.-L. Zamenhof. (Red. Aleksander Korjenkov), Kaliningrad 2006.
- Docteur Esperanto, Le. (1859-1917). (*Maria Ziolkowska*). Beauville 2005 (3a eld.)
- Zamenhof-strato, La. (*Roman Dobrzyński*). Kaunas 2005 (2a eld.)
- Familio Zamenhof, La. (*Zofia Banet-Fornalowa*), La Chaux-de-Fonds 2001.
- Homo kiu defuis Babelon, La. Ludoviko Lazaro Zamenhof. (*René Centassi, Henri Masson*). Tradukis G. Lagrange kaj Ph. Combot). Paris 2001.
- Zamenhofaj paroladoj 1-3. KD-oj. Nagoja 2001.
- L.L. Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj. Okaze de la 80a datreveno de lia morto. (*André Cherpillod*). Courgenard 1997
- Monumente pri Esperanto. Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj. (*Hugo Röllinger*). Rotterdam 1997.
- Paroladoj de d-ro L.L. Zamenhof. Toyonaka 1997.
- Historio de la lingvo Esperanto; 1887-1927 (*Edmond Privat*; unua parto 1911, dua parto 1927).
- Ludovikito (Ito Kanzi): Destino de Ludovika dinastio. PVZ. Originalaro 3. (Tokio 1991).
- Ludovikito (Ito Kanzi): Ĝis la homaranismo. PVZ. Originalaro 2. (Tokio 1990).
- Ludovikito (Ito Kanzi): Unua etapo de Esperanto. 1878-1895. PVZ. Originalaro 1. (Tokio 1989).
- Zamenhof, bildrakonte. (*Ghislaine Tilleux*. Tradukis J.-M. Derzelle). Wilrijk 1989.
- Vivo de d-ro L.L. Zamenhof en bildoj, La. (*Henk Thien*). Nederlando 1984.
- Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof. PVZ, kromkajero 1. (*Ludovikito*). Tokyo 1982.
- Kraško, Ryszard: Ludoviko Zamenhof – la kreinto de Esperanto. En: R. Kraško, J. Leyk, W. Ŝelazny: Zamenhof, movado, doktrino (Varsovio 1983).
- Kaŝita vivo de Zamenhof, La. Originalaj studoj. (*N.Z. Maimon*).Tokio 1978.
- Granda galerio Zamenhofa 2. (*Adolf Holzhaus*). Helsinki 1978.
- Zamenhof; Leteroj. (*Adolf Holzhaus*). Helsinki 1975.
- Granda galerio Zamenhofa 1. (*Adolf Holzhaus*). Helsinki. 1974.

Laŭ la Librokatalogo de UEA ĉi tiuj titoloj estas haveblaj en la libroservo de UEA.

Kun permeso redonita de UEA revuo *Esperanto* n-ro 2/2009

# La grandeco de D-ro L.L. Zamenhof

de Ivo Lapenna (1909-1987)




## Cent jarojn post la naskiĝo de Zamenhof en Bjalistoko

Antaŭ 100 jaroj – precize la 15-an de decembro 1859 – naskiĝis homo, kiu supervivis sin mem. La spertoj de intergenta sangado en Bjalistoko de lia infanaĝo inspiris lin al la suproj de

sublime altruisma sindediĉo por la bono de ĉiuj homoj. La krue-laj malfeliĉoj, surverŝitaj grandparte de lingvodiverseco sur tiun terpeceton inter Okcidento kaj Oriento, kuraĝigis lin serĉi kaj trovi solvon por la lingva problemo en kadroj mondaj. Lazaro Ludoviko Zamenhof estis judo: membro de tiu popolo suferanta, kiun jarcentaj persekutoj kaj torturoj hardis kaj multrilate nobligis, kaj kies filoj donis al la kulturo kaj

ĝenerala progreso nombron da eternaj valoroj. Lia patrolando estis Pollando, sed en la oficialaj registroj li estis enskribita kiel civitano de la Rusa Imperio, ĉar la krucumo de Pollando donis tiun regionon al la caro. Sed Zamenhof,



restante fidela al sia gento kaj patrujo, samtempe tamen leviĝis super sia popolo, super sia ŝtato kaj fariĝis loĝanto de la mondo, apartenanto de la homaro. Naskita en medio modesta, humila laŭ sia karaktero, li grandiĝis per sia verko kaj fariĝis personeco de formato tutmon-

da. Kaj hodiaŭ, cent jarojn post lia naskiĝo, lia nomo estas solene festata en ĉiuj landoj. Prezidantoj de respublikoj, ĉefministroj kaj ministroj, grandaj sciencistoj, lingvistoj kaj Nobelpremiitoj, artistoj, verkistoj kaj poetoj, edukistoj kaj kulturaj agantoj de diversaj landoj, de malsamaj politikaj sistemoj, religiaj kredoj kaj filozofiaj konvinkoj unuiĝis por patroni omaĝon de la homaro al homo, kies tuta vivo, ĉiuj intelektaj energioj kaj fizikaj fortoj estis dediĉitaj al ĝia pli granda feliĉo.

## En kio konsistas la grandeco de Zamenhof?

En julio de la jaro 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de la Internacia Lingvo por Rusoj. La 40-paĝa libreto konsistas el antaŭparolo, plena grama-

tiko kaj vortaro Internacia-Rusa kun klarigoj pri ĝia uzo. Ĝi estis la rezulto de multjara laborado. El tiu malgranda semeto elkreskis en iom pli ol sep jardekoj fortika arbo kun profundaj radikoj, abundaj branĉoj kaj densa foliaro. Ĝi estas nekontestebla fakto. Spitante ĉiujn obstaklojn – antaŭjuĝojn, rasismojn kaj ŝovinismojn, militojn, misprezentojn, rektajn malpermesojn kaj ne malofte persekutojn – la Internacia Lingvo traboris al si la vojon en ĉiujn partojn de la mondo, penetris en ĉiujn sociajn tavolojn, konstante riĉiĝadis per nova kultura enhavo kaj, paralele, daŭre interne evoluadis. El genia projekto ĝi transformiĝis en nuancoplenan instrumenton de pensado kaj komunikado. Ĝi fariĝis vivanta lingvo, kun tute propra spirito, de vivanta internacia kolektivo. Antaŭ Zamenhof multaj – inter ili kelkaj veraj gigantoj de la homa penso – serĉis konvenan solvon de la lingva ĥaoso. Post Zamenhof pluraj aliaj klopodis – ĉu pro persona gloremo, ĉu pro nescio aŭ nekompreneo de la problemo – ankoraŭfoje malkovri jam malkovritan Amerikon. Kelkfoje tiuj provoj elvokis iom da publika interesiĝo kaj kreis iom da konfuzo. Plej ofte restis senefikaj. Neniu el ili sukcesis firmiĝi. Neniu transpasis la limojn de teorie pli aŭ malpli taŭge planita projekto. Neniu socie enradikiĝis. Kaj pli aŭ malpli baldaŭ – kutime depende de la disponeblaj financaj rimedoj – malaperis unu post la alia en la mallumo de la forgeso. Kial, do, Esperanto sukcesis, dum ĉiuj aliaj projektoj de komuna lingvo, kvankam kelkfoje verkitaj de rekonitaj lingvistoj kaj apogataj de famaj nomoj, fiaskis? – *La kaŭzoj estas pluraj, sed tri el ili ŝajnas al mi esencaj:*

### **1. Elementoj maksimume internaciaj**

Zamenhof bone komprenis, ke lingvo internacia devas konsisti el elementoj *maksimume internaciaj*. Tial li

metis en ĝian vortaron radikojn jam internaciigintajn kaj signis la vojon por plua riĉiĝo de la lingvo per novaj internaciaj esprimoj. Sed li ankaŭ perfekte komprenis, ke lingvo ne konsistas nur el vortoj; plue, ke unuflanke, ne ekzistas absoluta internacieco de la vortoj – nek laŭenhave, nek laŭforme – kaj ke, aliflanke, por atingi facilecon estas necese ordigi kaj sistemigi tiun internacian lingvomaterialon kaj liberigi ĝin de balastaj akcesoraĵoj kaj absurdaĵoj. Nur iom post iom Zamenhof solvis tiujn demandojn, pri kiuj li okupiĝis ekde siaj plej junaj jaroj. Lia grandioza verko estas sendube rezulto de eksterordinara talento, sed same tiel ankaŭ de senfina pacienco kaj diligento. En la komenco la komplikaj gramatikoj de la lingvoj, kiujn li sciis, kaj iliaj dikegaj vortaroj timiĝis lin. Kelkfoje li efektive malesperis, sed ĉiam denove li provadis, kreadis, serĉadis la solvon. Lernado de la angla lingvo montris al li, ke eblas simpligi la gramatikon ĝis maksimumo. Hazarda rimarko de surskribo “sukeraĵejo” donis al li la ideon kiel, per bone planita sistemo de afiksoj, solvi la problemon de tro multaj vortoj. Restis ankoraŭ la demando de la vortradikoj. Unue li pensis, ke la vortojn oni povas tute simple inventi. Nur poste li rimarkis, ke granda nombro da vortoj jam internaciĝis en la normala evoluprocezo de la lingvoj. “Mi baldaŭ rimarkis” – li skribis al Borovko – “ke la nunaj lingvoj posedas grandan provizon da pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia – kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.”

Surbaze de tiuj principoj, kies ĝustecon li mem elprovadis dum multaj jaroj tradukante kaj verkante en sia lingvo-projekto, la fundamento de la Internacia Lingvo ricevis sian definitivan formon. Ĉio en tiu fundamento estas bone pripensita kaj antaŭe elprovita



en la praktiko. Ĉio celas krei bazon de plena lingvo, efektive internacia laŭ sia interna strukturo kaj ĝis maksimumo facila. Tial, ekzemple, Esperanto havas fonetikan ortografion. Tial en ĝi ĉiu elemento ricevis difinitan signifon kaj la tuta lingvo aglutinan karakteron kun plej simpla gramatiko. Per la sistemo de afiksoj la Internacia Lingvo akiris vastajn eblecojn de subtila derivado. Tio unuavide kelkfoje iom ĝenis la t.n. “tujan kompreneblecon”, per kiu kelkaj pseŭdosciencaj fabrikantoj de novaj projektoj provas blufi personojn parolantajn plurajn okcidenteŭropajn lingvojn, sed ĝuste tio donas al la lingvo multe pli grandan, *veran* kaj *realan*, internaciecon: ne, kompreneble, el vidpunkto de difinita nacio aŭ grupo da nacioj kaj de iliaj intelektaj satelitoj, sed el vidpunkto monda. Samtempe tiuj karakterizoj helpas la rapidan ellernon de la lingvo kaj ebligas ĝian tujan praktikan uzon skribe, lege kaj parole ne sole en Okcidento, sed sur ĉiuj kontinentoj; ne nur fare de kleruloj, sed ankaŭ fare de la plej ordinaraj homoj. La moto “Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia”, presita sur la kovrilpago de la unua lernolibro, entenas fundamentan principon de unuaranga graveco.

## 2. Lingvo estas socia fenomeno

Lingvo estas *socia fenomeno*. Por ke ĝi povu meriti la nomon de lingvo, ĝi devas kontentigi ĉiujn bezonojn de pensprimado de difinita homgrupo. Tio signifas, ke ĝi ne povas esti limigita nur al scienco aŭ nur al kiu ajn alia speciala fako, sed ĝi devas rilati al ĉiuj homaj aktivecoj. Tio plue signifas, ke ĝi povas esti evoluigata ne de tiu aŭ alia unuopulo – eĉ ne de la plej genia – sed nur de la tuta kolektivo, kies spirita proprieto ĝi estas, surbaze, de la efektivaj bezonoj, de tiu kolektivo. Ankaŭ tiun grandan veron Zamenhof bone komprenis. Li tuj “forcedis ĉiujn per-

sonajn rajtojn” je la lingvo kaj akcente deklaris jam en la unua lernolibro: “Internacia Lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia”. Precize tia ĝi estis kaj estas konsiderata de tiu internacia kolektivo, kiu ĝin akceptis ne por eksperimente aŭ lude pasigi la tempon dum ripoza neniofarado, sed por utiligi ĝin en siaj internaciaj rilatoj. Laŭ tiu korekta principo la lingvo efektive evoluis “per tiu sama natura vojo”, per kiu evoluas “ĉiu alia lingvo”, kiel diris Zamenhof en la jaro 1910. Sed li povis prave konstati jam en 1908: “Nia lingvo konstante pli riĉiĝas kaj elastiĝas. Iom post iom konstante aperas novaj vortoj kaj formoj, unuj fortikiĝas, aliaj ĉesas esti uzataj. Ĉio fariĝas kviete, senskue kaj eĉ nerimarkeble”. De tiam laŭ la sama maniero la lingvo plue konsiderinde evoluis kaj samtempe fortikiĝis ĝia interna unueco kaj kohereco pro la ampleksiĝo kaj daŭra multobligado de ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj inter ĝiaj uzantoj.

## 3. La ideo de komuna supernacia lingvo kaj la humaneca internaciismo

Sendube, la lingvaj malfacilaĵoj troviĝas en la radikoj mem de *la ideo de komuna supernacia lingvo*. Sed tiuj malfacilaĵoj fariĝas objektivaj obstakloj kaj sentiĝas kiel tiaj ĝuste tial, ĉar oni ekkonceptas la homaron kiel principe unuecan kaj la mondon kiel principe tutecan. Animo delikata kiel tiu de Zamenhof ne povis ne eksenti tion, des pli ke li naskiĝis, edukiĝis kaj vivis en medio plurnacia, saturita de reciprokaj intergentaj antagonismoj. Tute nature, do, li enspiris en la lingvon spiriton de humaneco kaj internaciismo. Ankaŭ tiurilate lia subjektiva penso harmonie akordis kun la objektive formiĝantaj kondiĉoj. Jam en la jaro 1878, kiam Lazaro Ludoviko estis ankoraŭ lernanto en gimnazio, li kaj liaj junaj kolegoj entuziasme kantis en la unua, ankoraŭ ne ellaborita pro-

jekto de komuna lingvo: *Malamikete de las nacjes Kadó kadó, jam temp' está.* Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! Por Zamenhof komuna tuthoma lingvo neniam estis celo al si mem, sed unu el la plej gravaj rimedoj por forigi la miskomprenojn, suspektojn kaj malamon inter la popoloj, por krei kondiĉojn de interkompreniĝo kaj reciproka respektado. La esenco de tiu ideo estas koncize esprimita en unu sola simpla frazo, kiun li eldiris en sia rimarkinda parolado en Bulonjo-sur-Maró tiun gloran tagon de la jaro 1905, kiam la unuan fojon en la historio de la homaro homoj de diversaj nacioj interkompreniĝis per komuna supernacia lingvo: “Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne Francoj kaj Angloj, nek Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj”. Zamenhof tamen ne supertaksis la rolon de la lingvo, kiel kelkfoje neinformitaj personoj klopodas kredigi. En Ĝenevo, en 1906, li precizigis: “Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikigado kaj konatigado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinmaltrudado”.

La humaneca internaciismo – hodiaŭ praktikata kaj flegata en sia plej pura formo inter la personoj parolantaj la Internacian Lingvon – estis kaj estas potenca ideo fono de la lingvo. Ĝi dominis al la Internacia Lingvo koron kaj animon, tute specialan karakteron kaj apartan fizionomion. Kaj sen tiuj neniuj lingvo povas vivi, kreski kaj maturiĝi. La tri tuŝitaj elementoj kaŭzis la ple-

nan sukceson de Esperanto el lingva vidpunkto. Ili estas unu el la garantioj por la plua disvastiĝo kaj evoluo de la Internacia Lingvo, por ĝia ĉiam pli ampleksa apliko en la internaciaj rilatoj, por ĝia estonteco. Tia efektive *internacia* lingvo estas samtempe baza rimedo de integriĝo en supera homara tuto, sed tiel ke samtempe estu konservitaj la individuecoj de ĉiuj nacioj, de la naciaj kulturaj valoroj kaj de iliaj plej grandaj trezoroj: la naciaj lingvoj.

Cento da placoj kaj stratoj tra la mondo hodiaŭ portas la nomon de D-ro L. L. Zamenhof. Monumentoj estas starigitaj al li en diversaj lokoj. Ne plu ekzistas enciklopedio aŭ serioza lingvistika verko, kiu ne mencias la iniciatinton – kiel li mem sin nomis – de la Internacia Lingvo. Ofte oni diras, ke tiu aŭ alia grandulo de la spirito vivas plue tra la daŭra valoro de sia verko. Sed se pri iu tiu diro estas ĝusta, tiam certe unuavice pri Zamenhof. Ĉar li plue ekzistas kaj ekzistos en la estonteco tra la lingvo, kies fundamentojn lia genio donacis al la homaro kaj kiu hodiaŭ vivas en la abunda kaj daŭre kreskanta tutmonda literaturo, en la gazetaro kaj revuoj, sur la ondoj de radio kaj ekranoj de televido, en kongresoj kaj konferencoj, en internaciaj amikaj rondoj kaj eĉ en familioj, sur la lipoj de miloj kaj miloj da personoj tra la mondo, alportante tien, kien ĝi penetris, almenaŭ iom de tiu bonvolemo, kiu enspiris en ĝin la nobleco de homo kun granda animo kaj profunda menso el Bjalistoko. Jes, monumentoj estas starigitaj al Zamenhof, sed la plej grandan kaj la plej belan monumenton li starigis al si mem per sia verko.

*La artikolo estas elĉerpaĵo el “Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro”, eldonita en 1960 (UEA. Redonita kun permeso de Birthe Zacho Lapenna, ankaŭ en Esperanto-USA, n-ro 3-4/2007, www.esperanto-usa.org.*

# Marie Schrøder (1882-1909)

de Betty Chatterjee, Kopenhago



## La sortobato

Eĉ se neniu viva esperantisto renkontis Marie Schrøder, ŝajne ĉiuj danaj esperantistoj konas la tristan historion pri ŝia morto pro falo de la monto Frohe-nalpstock en la svisa montaro la 27-an de aŭgusto 1909. Evidentiĝas ke ŝi, sen troigo, ne estis nur belulino, sed ankaŭ unu el niaj plej gravaj pioniroj. Eĉ se ŝia kolegino Margrethe Noll estis nomita la patrino de la dana Esperanto-movado, pli ĝuste ni diru, ke la dana movado havis du patrinojn dum la unuaj du jaroj.



En Dana Esperantisto, numero 9, septembro 1909, Margrethe Noll skribis nekrologon pri ŝi:

*“La vera animo forlasis nin’ tiel skribis antaŭ unu jaro unu el la KEK- aninoj, kiam S-ino Marie Schrøder forlasis la*

*estraron de KEK: tiam ni ne pensis, ke post unu jaro la tuta dana esperantistaro povos ripeti la saman frazon aldolante la malgrandan vorton ‘por ĉiam’. Jes, nia kara, ŝatata samideanino estas for; je mardo la 31-an de aŭgusto alvenis de Ĝenevo telegramo, kiu mallonge raportis ke: La esperantistino – Marie Schrøder estas trovita morta.*

*Neniam la esperantistoj en Danujo ricevis pli malĝojan sciigon ol tiu; neniu povas kompreni, ke la juna gaja virino, kiun oni ĵus adiaŭis antaŭ ŝia vojaĝo al Barcelono, ne atingos ĉi-tiun urbon, ne revenos kaj rakontos pri la kongreso, kie ŝi reprezentus Danujon kiel deligito. Granda estas la doloro en la esperantistaro, ĉar grava estas la perdo; certe neniu laboris tiel multe kaj fervore por nia afero dum la lastaj du jaroj, neniu sin oferis tiel volonte kaj donis sian tutan liberan tempon kaj ĉiujn siajn fortojn al la Esperanta laboro.*

*Se ni legos la historion de la movado en Danujo dum la du lastaj jaroj, ni ĉie trovos la nomon de S-ino Schrøder. De la unua momento, kiam ŝi fariĝis Esperantisto ŝi nelaceble aranĝis ĉion; estas ŝi, kiu fondis K.E.K., kiu starigis C.D.E.L., kiu ĉefe aranĝis la postkongresajn tagojn en Kopenhago dum la lasta somero; ŝi plibonigis nian gazeton, elsendis la kolektarojn de gazetoj inter la diversaj kluboj, proponis la unuan danan esp. jarkunvenon kaj ankaŭ zorgis pri ĝia efektiviĝo; ni ĉiuj memoras la*

grandan laboron, kiun ŝi havis antaŭ ĉi-tiu unua loka kongreso en Danujo, kaj ankaŭ sian grandan sukceson, kiam ŝi preskaŭ sen la antaŭ-preparo parolis, ne sole por si mem, sed ankaŭ por s-ro Skeel-Gjörling, kiu ja bedaŭrinde ne povis ĉeesti. Ne malpli valoraj estis ankaŭ ŝiaj penadoj por kunligi niajn svedajn samideanojn al Dana Esperantisto.

Jes, certe ne ekzistas ia entrepreno en la dana Esperanto-movado, pro kiu ni ne ŝuldas dankon al s-ino Schröder. Ĉiuj multe aŭdis pri ŝia granda energio, kaj ankaŭ multaj konis ĝin, sed certe neniu konis ŝin kaj ŝian laboremecon kiel mi, kiu dum unu kaj duona jaro preskaŭ ĉiutage laboris kune kun ŝi kaj de proksime vidis kiom da tempo kaj kiom da fortoj ŝi uzis por servi al nia afero; ofte ŝi havis tiom da laboro, kaj laboro tute okupis ŝiajn pensojn, ke ŝi forgesis manĝi dum la tuta tago. Estis granda plezuro labori kune kun ŝi, ĉar ŝi ĉiam laboris kun ĝojo kaj intereso, kaj dum ĉi-tiuj laborplenaj vesperoj kaj noktoj, mi konatiĝis kun ŝia varma kaj riĉa koro; ŝi estis sindona kaj fidela kiel amiko, pardonema kontraŭ malamikoj. La dana esperantistaro perdis unu el la siaj plej valoraj apogoj, al kiu ni ŝuldas multe da dankoj, kaj kiam ni diros al vi, nia kara neforgesebla samideanino, la lastan adiaŭon, ni aldonu ankaŭ nian plej sinceran dankon pro via granda laboro; la memoro pri vi ĉiam restos inter viaj dankemaj samideanoj kaj amikoj.”



Margrethe Noll ne estis la sola, kiu tiel laŭdis ŝin. Dum la solena malfermo de la 5-a Universala Kongreso en Barcelono en kiu partoprenis 1300 personoj, D-ro Zamenhof zorgoplene parolis pri ŝia forpaso. Li petis al la ĉeestantaro, ke oni leviĝu por honori ŝian memoron kaj proponis sendi kondolencan telegramon al ŝia familio. Poste kiam la dana esperantistaro komencis monkolekton por la starigo de tombŝtono, li donacis la plej grandan sumon de 10 rubloj, t.e. 19 kronoj. Entute oni ricevis 190,52 kronojn de la esperantistaro kaj de Dario kaj de aliaj landoj.

En aŭgusto 1910 okazis Socialdemokrata Kongreso en Kopenhago. Pluraj el ties partoprenoj estis esperantistoj, tial dimanĉon la 28-an de aŭgusto 1910 kolektiĝis granda kaj internacia grupo esperantista en la tombejo Assistens Kirkegård apud la tombo de Marie Schröder. Tiun ĉi tagon okaze de la unua jardatreveno de ŝia morto oni renkontiĝis kun la familianoj por solene starigi tomboŝtonon. La bela monumento portas reliefan portretan medaljonon en bronzo. Tiu ĉi skulptaĵo estis farita de iu s-ro Lindow, kies edzino estis fervora esperantistino.

### **Diligentulino**

Kiu ŝi estis, kia ŝi estis kaj kio okazis dum la nur 20 monatoj en kiuj ŝi oferis sin al la Esperanta afero?

Wihelmina Marie Schröder naskiĝis

la 18-an de marto 1882. La gepatroj nomiĝis Peter Christian Harreskou Schröder kaj Karen Marie Pedersdatter, ilia tombo situas apud la tombo de Marie. Ŝi estis parenco de la ĵurnalisto Harald Schröder, kiun la gazeto Politiken sendis eksterlanden en 1907, por ke li konstatu, ĉu Esperanto estis tiel





grava, kiel la adeptoj jam kredas. Marie Schröder estis unu el la 412 personoj, kiuj aliĝis al la kurso aranĝita de la gazeto Politiken en aŭtuno 1907.

Dekomence ŝi estis agema virino. Marie Schröder eniris la estraron de KEK la 2-an de januaro 1908. La estraron de Centra Dana Esperantista Ligo ŝi ankaŭ eniris kiam ĝi estis fondita printempe 1907. Tie ŝi aktiviĝis en la administra kaj vojaĝa elektitaroj. Tial ŝi estis unu el la personoj, kiuj havis la respondecon por aranĝi kaj la vojaĝon al la 4-a Universala Kongreso en Dresdeno kaj la treege ambician postkongreson en Kopenhago.

Marie Schröder estis unu el la preskaŭ 20 KEK-anoj, kiuj partoprenis la Dresdenan Kongreson, kaj dank' al ŝi restas ege entuziasme pasia priskribo pri tiu ĉi evento, kiu kompreneble estis por ŝi la unua universala kongreso kaj verŝajne ŝia unua eksterlanda vojaĝo. Kortuŝe estas memori ke tiu ĉi vojaĝo estis ŝia lasta. Komence ŝi skribis:

*"Se oni volas konservi la tradician regulon, ke ĉiu nova Esperanto-kongreso devas superi la antaŭan, bedaŭrinda estas la komitato por la Kvina. Rigardita de ordinara homa vidpunkto ĝia tasko ŝajnas esti neplenumbla!"*

*Kiamaniere superi la solenan malferman feston, la ĝojegan respektan minutlongan saluton per kiu la ĉeestantaro certigis al nia kara Majstro sian dankemecon kaj fidelecon al li kaj lia granda vivlaboro, - kia maniere superi la grandiozajn festojn kaj ekskursojn, la neforgeseblan, brilegan, prezentadon de 'Ifigenio en Taŭrido' kaj antaŭ ĉio la harmonian, korĝojigan kunrestadon de unu kaj duona milo da trideknaciaj samlingvanoj!*

*Malfeliĉa, enviinda kvina komitato, kiu troviĝos inda je tiu honora metio!"*

Do daŭre ŝi rakontis pri la granda publika kunveno en *Vereinshaus*, kie parolis multaj eminentuloj pri la es-

tonteco de Esperanto. Post tio, longe post noktomezo oni paroladis kaj kantis la plej amatajn Esperantajn kantojn. La venontan matenon oni frue leviĝis por ĉeesti la solenan malfermon en kiu partoprenis la Majstro. Dum la tuta semajno ŝi spertis nekredeble agrablajn okazojn kaj renkontiĝojn, kelkajn el ili ŝi tute ne povis priskribi pro ties grandeco: ekskursoj, teatraĵoj, grandiozaj kolektoj, koncertoj kaj ĉiam la amaso de samideanoj el tridek landoj. Finfine ŝi skribis: *La harmonia, sukcesplena Kvina estis finita, - vivu la kvina en Barcelona kaj la sesa en Chautauka!*

### **Vizito de Klara kaj Ludoviko Zamenhof en Kopenhago 1908**

Margrethe Noll skribis en sia rakonto en la libro 'Konversacia Esperantista Klubo', eldonota 50 jarojn pli poste:

*(26.08.1908) Entuziasme oni antaŭe havis la frenezan ideon inviti al postkongresaj tagoj en Kopenhago. Zamenhof timis la longan marvojaĝon kaj rifuzis, sed dank' al la persvado de f-ino Schröder, li tamen cedis, kaj tuj enskribis sin lia tiama kortego el la plej eminentaj esperantistoj, kiu ĉiam sekvis lin. 80 personoj entute el 16 nacioj, de Siberio ĝis Brazilio. Granda akcepto kun verdaj standardoj en la ĉefstacio kaj eĉ E-parolantaj policianoj kun verdaj steloj.*

*(27.08.1908) La grandioza programo inkludis ekskurson al Helsingør per ŝipo, lunĉo kaj vizito en Kronborg, Marienlyst kaj Helsingborg. Vespere oni festis ĉe KEK.*

*(28.08.1908) Vizitoj en la muzeo de Thorvaldsen, la bierfarejo de Carlsberg, la besta ĝardeno, la paviliono de Langelinie, la virineto de la maro, la Gliptoteko (akcepto de bierfaristo d-ro Jacobsen kaj oficiala akcepto de urbestro Jensen, kiu faris sian paroladon en Esperanto (laŭ manuskripto). Vespera*





Gesinjoroj Zamenhof inter Kopenhagaj Esperantistoj. Maldekstre Marie Schröder, Frederik de Skeel-Gjørling, Klara kaj Ludoviko Zamenhof 1908

*aranĝo en Tivoli, kaj adiaŭa glaso ĉe Wivel. La komponisto de la Esperanto-himno barono de Ménil verkis jenan adiaŭan saluton:*

*Adiaŭ, afablaj kaj karaj amikoj,  
Adiaŭ, vi spritaj kaj ĉarmaj daninoj.  
En niaj la koroj pri via akcepto  
Konservas vi ĉiam tre dolĉan memoron!'*

### **La vera animo**

Aŭtune 1908 ŝi ekŝiĝis el la estraro kune kun pluraj el la aliaj inkluzive la prezidanton. Ĉu regis la problemoj en la klubo? Mi kredas ke ne, ĉar okaze de tiu ĉi evento oni agrable festis la 15-an de oktobro. Dum la festo la kasisisto s-ro Barnuel dankis la eksmembrojn de la estraro, 'turnante sin kun afablaj vortoj al ĉiu el ili aparte, sed precipe s-inon Schröder, kiu fondis la klubon li kore dankis kaj laŭdis kiel la patrino de l'klubo, *la veran animon*. Iu (F.K.?) verkis honoran kaj laŭdan poemon pri ŝi:

*La vera animo forlasis nin,  
Sen animo estas la klubo;  
Kaj kiu nun anstataŭos ŝin  
En la nova estrara grupo?  
Neniu laboris pli multe ol ŝi  
Por ĉiuj niaj aferoj;  
Eĉ parton da noktoj oferis ŝi,  
Se ne sufiĉis vesperoj.  
El tuta koro ni dankas vin,  
Laboreman, ŝatatan, animon  
Sinceran dankemon ja sentas ni  
Por vi kaj plej grandan estimon.*

Eble la kialo por ŝia ekŝiĝo de la estraro temas pri la troega laboremo, ĉar ŝi respondecis pri multe da aliaj aferoj, inkluzive tiun de CDEL. Tial verŝajne ŝi klopodis iom bremsi sin. La 13-an de februaro 1909 okaze de la ĝeneralkunveno 'ŝi retiris sin laŭ propra deziro'. Tamen du el ŝiaj proponoj estis akceptitaj:

1. Elsendo de kolektaro de esperantaj gazetoj por senpaga cirkulado inter la diversaj kluboj.

2. Starigo de dana esperantista jarkunveno.

Eĉ se ŝi ne restis kiel aktivulo en estraro, ŝi daŭre estis administranto en Store Kongensgade 39.

### **Plua aktiveco**

La unua dana esperantista jarkunveno okazis en Aarhus dimanĉe la 11-an de julio 1909. La 70 partoprenantoj el Aalborg, Aarhus, Kopenhago, Odense, Randers, Rønne, Skive kaj Vejle renkontiĝis en Alléenberg Restoracio. Skeel-Gjorling la prezidanto ne povis ĉeesti, tial Margrethe Schröder anstataŭis lin. En sia prelego, ŝi rakontis pri la historio kaj la evoluo de la helpolingvo kaj ties signifo por la komerco kaj la turismo. Plue ŝi parolis pri la fondiĝo de la Universala Esperanto-Asocio. Finfine ŝi idealisme apelaciis al la gepatraro kaj la lernantaro, ke ili apogu la Esperantan aferon pro la faktaj kaj la idealismaj valoroj, kiuj estas enhavotaj en la kontaktoj inter la junularo en la tuta mondo.

Kiel kunredaktoro kun Margrethe Noll de la Dana Esperantisto ŝi monate legis proksimume 60 esperantajn gazetojn de aliaj landoj, kaj poste ŝi skribis pri ili aŭ citis el ilia enhavo. (informo pri tio troviĝas en Kontaktilo aprilo 1947). Ekzemple en la aprila numero de la Dana Esperantisto aperis novaĵoj de Hispanio, Usono, Finnlando, Pollando, Svislando, Bohemio kaj Japanio. Ŝi mem trovis la tempon por verki artikolojn ekzemple:

- Pri kvarnacia pentekosta ekskurso
- La kongresaj tagoj en Dresdno
- La postkongresaj tagoj en Berlino kaj Kopenhago
- La Esperantista Gazetaro

Ŝi eĉ trovis la tempon por traduki esperanten. En la Dana Esperantisto oni legas, ke:

*La 23-an de aprilo 1907 oni aŭdis s-inon Schröder laŭtleĝi memtradukon de 'Kristnaska Nokto' de C. Ewald kaj la rakonton 'Guteto de lakto'. Ŝi tradukis la danan nacian kanton: Reĝ' Kristijan staris ĉe la mast' en pulva fum' la glavon uzis li kun fort' por malamik' terura sort' ktp.*

Tiun ĉi kanton oni kantis dum la unua dana esperantista jarkunveno en Aarhus en 1909.

### **Politiko kaj polemiko**

Ŝajnas, ke ŝi interesiĝis pri la balotrajto de virinoj. En 1908 danaj virinoj povis unuafoje baloti en la elektoj de la "civitana reprezentantaro" (magistrato) de Kopenhago. La 11-an de marto 1908 *sinjorino Marie Schröder parolis pri 'La virinoj kaj la elekto de burĝa reprezentaro', absolute aktuala temo, ĉar je la sekvanta tago la kopenhagaj civitaninoj unuafoje partoprenos en tia elekto. Akcentante precipe, ke kune kun la voĉdonrajto la virinoj ricevis ankaŭ voĉdondevon, la parolinto gvidis la aŭskultantojn tra ĉiuj okazantaĵoj de elekta tago, kaj post la instruktiva parolado ĉiuj KEK-aninoj konis siajn tiurilatajn devojn.*

Dum la nur 20 monatoj de ŝia fervora esperanta agado, eksplodis la Ido-konflikto. Ekde februaro 1909 okazadis pli-malpli akra debato kun titolo 'Paco' en la revuo Dana Esperantisto. Fine ŝi proponis, ke oni daŭre diskutu la lingvajn demandojn dum la Barcelona kongreso, tie kie ŝi estis elektota kiel delegito por Danio. Tamen bedaŭrinde ŝi neniam atingis la kongreson – jen grandega perdo por la familio kaj la egale grandega perdo por la dana Esperanto-movado. Jes, mi vere volus koni ŝin!

# Frederik de Skeel-Gjørling

de Ileana Schrøder, Kopenhago



11-a de februaro 1876 –  
14-a de oktobro 1910

Pri Skeel-Gjørling ni povas legi en Dana Esperantisto de 1910, ke estas li, kiu enkondukis la internacian lingvon esperanto en Danio. Li sekvis la movadon kaj la sukceson de esperanto kun la plej granda intereso kaj amo, eĉ dum sia restado eksterlande, kiam generalo H. Sebert alvokis lin al Parizo kaj poste al Bruselo por la Brusela ekspozicio. Naŭ jarojn antaŭe, kiam li loĝis en Aalborg, kie li estis tradukisto kaj interpretisto en diversaj lingvoj kaj instruisto ĉe la komerca lernejo, li eksciis pri esperanto, kaj de la sama momento li fariĝis entuziasma admiranto de la lingvo kaj de la interna ideo de la esperantismo.

La unua rimarkinda laboro, kiun li faris por la movado, estis la verkado de

”Esperanta dana-norvega vortaro”, kiu aperis en la jaro 1904, kaj la sekvontan jaron 1905 jam aperis lia ”Lernolibro en Esperanto” kun rekomendo de prof. Otto Jespersen (1860-1943). En 1906 li eldonis malgrandan ”Frazlibron”, kaj komencis labori pri dana-esperanto vortaro, kiun li prokrastis, por ke ne aperigu tro multe da vortaroj, kaj li bedaŭrinde ne finis tiun verkon. Li tradukis ankaŭ kelkajn el la plej konataj fabeloj de H.C. Andersen, ”En harmonio kun la eterneco” de la fama amerika verkisto Ralph Waldo Trine kaj ”Lernolibro kun bildoj” por infanoj de Thora Goldschmidt.

En la jaro 1907 la gazeto ”Politiken” starigis siajn grandajn kursojn en esperanto kaj alvokis Skeel-Gjørling al Kopenhago por gvidi ilin. Pli ol 400 lernantoj partoprenis, kaj ekde tiu tempo li restis en Kopenhago, ĉar li vidis, ke la intereso por esperanto estis pli granda en la ĉefurbo ol en la provinco, kaj ke li pli bone povas gvidi la movadon de Kopenhago ol de malgranda urbo. Jam la jaron antaŭe li fondis la ”Societo de danaj Esperantistoj”, kaj post la unua trimonata kurso en Kopenhago li kune kun Marie Schrøder en januaro 1908 fondis ”Konversacia Esperantista Klubo”, kies honora membro li fariĝis. Estas preskaŭ superflue diri, ke li ankaŭ estis inter la gefondintoj de ”Centra Dana Esperantista Ligo” (1908), kies prezidanto li estis de 1909-1010. ”La societo de danaj Esperantistoj” en la

jaro 1907 komencis eldoni esperantan gazeton "Helpa Lingvo", kune kun s-ino Mønster. Skeel-Gjörling redaktis ĝin, ĝis ankaŭ KEK fariĝis posedanto de la gazeto, kaj ĝi ŝanĝis formaton kaj aperis sub la nomo de "Dana Esperantisto". Kiel redaktoro li redaktis la gazeton de 1908 ĝis 1910, kune kun Marie Schrøder (1882-1909) kaj Margrethe Noll (1874-1962), escepte dum la unuaj monatoj de ĝia apero.

La plej ĝoja esperanta okazintaĵo dum lia restado en Kopenhago certe estis la tago, kiam li salutis d-ron Zamenhof, kiu estis gasto en Kopenhago dum la postkongresaj tagoj post la UK en Dresden 1908. Li ofte parolis pri tiuj tagoj, neforgeseblaj al li, kiam li staris vizaĝo al vizaĝo kun tiu viro, kiun li jam longe admiris. Grupa foto montras Skeel-Gjörling sidante inter Marie Schrøder kaj geedza paro Klara kaj Ludoviko Zamenhof.

La granda lerteco kaj lingva sciado, kiun posedis Skeel-Gjörling havigis al li multajn honorajn oficojn. De "Lingva Komitato" li fariĝis membro, tuj kiam ĝi fondiĝis; cetere li estis membro de "Internacia Scienca Asocio" kaj multe da aliaj oficoj, sed li estis neordinare modesta, kaj li neniam parolis pri tiaj aferoj, li nur faris sian devon.

Kiel sekretario por Danio li ankaŭ faris grandan laboron por la "Delegitaro" en Parizo 1907. Ekde la momento kiam la delegitara komitato anigis al s-ro de Beaufont, kiu trompis d-ron Zamenhof kaj la esperantistaron, Skeel-Gjörling fariĝis la plej akra kontraŭbatalanto de ido kaj la idista movado. Kompreneble li estis inter la subskribantoj de la "protesto" kontraŭ la delegitaro.

Meze de marto 1910 Skel-Gjörling forlasis Danion kaj vojaĝis al Parizo, kaj poste al Bruselo kie li prezentis esperanton al la multaj kongresoj, kiuj okazis dum la monda ekspozicio, kaj kie li redaktis la "Kongresa Revuo" kaj france kaj esperante.

Kiel reprezentanto de "Centra Oficejo" en Parizo li traktis kun la direkcio de "Internacia Bibliografia Instituto" en Bruselo, kie li laboris pri la enkonduko de Esperanto kiel helpa lingvo en la instituto. Ĝus antaŭ lia morto la instituto oficiale akceptis la lingvon, kaj tiu estis grandega venko por esperanto, ĉar la instituto estis subvenciita de la belga ŝtato.

Lia tute ne atendita kaj tro frua morto ŝokis la danan esperantistaron kaj precipe la kopenhaganojn, kiuj nur unu jaron antaŭe perdis Marie Schrøder (1882-1909). Lia morto ŝajne estis tute sensenca bato de la sorto, ĉar post jarlongaj suferadoj kaj bataladoj, lia privata vivo kiel ankaŭ lia situacio en la socio komenciĝis sin montri en pli brila lumo. Post lia bonega laboro dum la monda ekspozicio en Bruselo, li ricevis la taskon kiel redaktoro de granda internacia monata revuo, nome "La revuo de la internacia vivo". Sed en Parizo kaj Bruselo li trege laboris, plej ofte ankaŭ dum la tuta nokto. Eble oni devas serĉi la veran kaŭzon de lia subita morto en tiu trolaciĝo, kiel oni mencias en la memora parolado en KEK faritan la 3-an de novembro 1910.

Certe estas, ke legante pri lia vivo ni povas konstati, ke pro lia fervoreco, pri lia nobla afabla kaj ĉiam modesta personeo, la movado konservis la memoron pri li dum unu jarcento. Lia ekzemplo instigu nin al novaj venkoj!

# Margrethe Noll – la patrino de la dana esperanta movado de Betty Chatterjee, Kopenhago



Esperantistoj fieras pri la historio de la Esperanto-movado. Kiam mi estis nova esperantisto mi legis nur pri Ludoviko Zamenhof kaj aliaj gravaj pioniroj ĉie en la mondo. Pri la danaj pioniroj mi nenion sciis. Tamen post kvarmonata lernado de la lingvo io okazis, kiu fajerigis mian intereson. Iun tagon mi renkontiĝis kun ne-esperantista amikaro, al kiuj mi rakontis pri mia esperantistiĝo.

Preskaŭ ĉiuj opiniis, ke la elekto estis ridinda; kia blago – Esperanto estas kompreneble tiel formortinta kiel la birdo dido, ktp. Tamen unu el ili subite ekmemoris, ke li iam vidis malkutiman tombon en Garnisons Kirkegård. Laŭ li, la tombo estas rimarkinda pro la fremdlingva epitafio, kiu estas skribita sur la tomboŝtono kaj pro la apuda stelforma arbo. Tial, ni samopiniis, ke evidente estas esperantista tombo.

La sekvan tagon mi vizitis la tombejon por trovi la tombon. Senprobleme ĝin trovante mi legis la epitafon: Margrethe Caroline Noll 22.05.1874 - 30.12.1962 – Patrino de la dana Esperanta movado.

Kiu estis Margrethe Noll, kaj kial oni nomas ŝin la patrino de la dana

movado? – Nia patrino devus esti memorenda, tamen nenion mi scias, tial mi komencis interesiĝi pri ŝia vivo kaj agado. Pro la bonkora helpemo de tiom da klubanoj mi trovis kelkajn informojn pri tiu ĉi mirinda virino.



Margrethe Noll naskiĝis en Kopenhago la 22-an de majo 1874. Laŭ la skribaĵo de Paul Neergaard: ŝi naskiĝis en la kastelo de la reĝo ... kaj dum siaj infanjaroj renkontiĝis en la reĝa korto kun la infanoj de la reĝo, la postaj reĝoj de la dana kaj norvega popoloj. Kia interesa enigmo! – Ĉu la patro estis dungito en la kastelo? – Oni scias, ke ŝi iam loĝis en Fredericiagade 6, kiu estas sufiĉe proksime al Amalienborg. Ĉu tiu ĉi

loĝejo estas ŝia tutviva hejmo?

Laŭ profesio, ŝi unue estis instruistino, do poste ŝi laboris kiel sekretariino kaj librotenisto. Ŝi ŝajne tre interesiĝis pri lingvoj, ŝi regis la anglan, la francan kaj la germanan.

London la 2-an de septembro 1907 ŝi estis unu el la kvarcento de personoj kiuj aligis la trimonatan kurson, aranĝita de la gazeto "Politiken". La kursgvidanto estis S-ro Skeel-Gjøring, kiu verkis la unuan danan – esperanton





Foto: Sven Friis Jørgensen

vortaron (1904) kaj lernolibron (1906). Post la kurso Margrethe Noll estis unu el la unuaj membroj de la Konversacia Esperantista Klubo, kiuj jaŭde kunvenis en Kongens Nytorv 8. Kiel kunverkisto de Konversacia Esperantista Klubo, 1908-58, ŝi skribis: “La severa regado de la klubo kaŭzis, ke oni vere povis paroli Esperanton post la unua vintra sezono”.

Ŝi verŝajne estis jam tre agema virino, ĉar la venontan jaron (1909) ŝi fondis la Esperanto-klubon en Århus. Dum la Ido-polemiko, kiu en Danio estis instigita de la mondfama lingvisto Profesoro Otto Jespersen, ŝi estis la plej aktiva kontraŭstaranto de tiu ĉi skismo en Danio. Post la Universala Kongreso en Dresdno en 1908 Ludoviko Zamenhof gastis la post-kongreson en Kopenhago. Tie Margrethe Noll konatiĝis kun li, poste ili certe interkorespondis, ĉar dum la unua monda milito ŝi estis peranto inter la maestro kaj lia plej aĝa filino Sofia. Margrethe Noll persone kumunikis la informon pri lia morto en 1917 al Sofia Zamenhof.

Dum la tuta vivo ŝi estis treege agema esperantistino. Kiel instruitino ŝi gvidis multajn kursojn kaj por plenkreskuloj kaj por infanoj. Ĝis 1955 ŝi estis sekretariino de la Esperanta

Ekzamena Komitato. Plue ŝi estis komitatano de la Internaciaj Esperantistaj FERIAJ Kursoj en Helsingør kaj Vejle.

Margrethe Noll estis tre verkema esperantisto, kiu verkis du librojn kaj multajn gazetajn artikolojn. Ŝi estis ankaŭ aktiva kongresano, kiu entute partoprenis 19 Universalajn Kongresojn. Ekde 1922 ĝis 1929 ŝi estis prezidanto de la Societo de Danaj Esperantistoj.

Krom Esperanto ŝi kredis je teozofio, reenkarriĝo kaj pacifismo. Plue ŝi estis kontraŭstaranto de viandomaĝado, alkoholo, kafo, teo kaj tabako. Teda? Tute ne! Ĉiuj, kiuj memoras Margrethe Noll rakontas pri bonkora, arda, tolerema virino kiu havis mildan sencon de humoro. Hejme ŝi instruis la junularon, kaj unu el ili Paul Thorsen diris al ŝi, okaze de ŝia 80-jara naskiĝtago ke:



Foto: Sven Friis Jørgensen

“Belaj kunvenoj sub via prizorgo spirita kaj ankaŭ materia, helpita de proksima bakisto”.

La patrino de la dana Esperanto-movado mortis la 30-an de decembro 1962. Ek de tiam la Margrethe Noll Fonduso jam prizorgas la tombon. Plue oni uzas la monon por subteni kaj la esperantajn aferojn en Danio kaj por subteni edukadon de esperantistoj pere de kursoj en Danio kaj eksterlande.

# Martinus 2

## Mallonga biografio

de Erik Gerner Larsson



Ĉar la studo de la mondpercepto de Martinus nepre kondukas al la penso, ke oni ĉi tie staras antaŭ kreado, kiu tiagrade estas originala, ke ĝi estas sen egalo, tiam priskribo de ĝi estos nesufiĉa sen lia biografio.

Martinus naskiĝis nokte la 11-an de aŭgusto 1890 ĉe la malgranda nord-jutlanda urbo Sindal. Ĉar lia patrino estis needziniĝinta, li tuj de la naskiĝo estis sendata al la frato de sia patrino kaj ties edzino. Ĉi tiuj du homoj, kiuj estis malriĉaj kampar-laboristoj, jam havis plurajn infanojn, sed tio tamen en neniu maniero malhelpis ilin doni al la malgranda Martinus senzorgan kaj feliĉan infanecon. Kun sia propra patrino li apenaŭ konatiĝis, ĉar ŝi jam mortis, kiam li estis infano. Laŭlibran edukadon ne posedis liaj gezorgantoj. La patra zorganto povis nek legi, nek skribi, lia zorgantino tamen pene kapablis trasilabi gazeton. Dekdujara Martinus gajnis sian panon kiel brutargardisto, kaj post sia konfirmacio li provis diversajn okupadojn, ĝis li kiel duonmatura junulo komencis kiel lernanto en laktejo. Ĉe ĉi tiu fako li restis kun mallongaj interrompoj, ĝis li en la printempo 1921 travivis la spiritan procedon, kies rezultatoj en tiel alta grado estas fakto hodiaŭ en formo de “La Libro de la Vivo 1”. Ĉi tiu procedo, kiun li en sia verko donis la nomon “La granda naskiĝo” kaŭzis vekigon de spiritaj kapabloj kaj ecoj, kiuj ĝis tiam dormetis latente en lia konscio, kaj en la daŭro de mallonga tempo ŝanĝis lian fizikan

cerbon tiel, ke li pere de ĝi nun kapablis interrilati kun la spirita mondo, je kiu li partoprenigas nin per sia laboro. Dank’al amindaj komprenemaj amikoj li sukcesis iom post iom liberigi sin de la fizika laboro, tiel ke li en la daŭro de malmultaj jaroj tute povis dediĉi sin al la kreado de “La Libro de la Vivo”, kies unua volumo aperis en Julio 1932, kaj kies dua volumo ĝuste nun komencis aperi en lia gazeto “Kosmos”. La unua numero de ĉi tiu gazeto aperis en aprilo 1933 kiel rekta rezulto de la eldono de l’ unua volumo de “La Libro de la Vivo”, pro tio ke rapide ekaperis ĉirkaŭ ĉi tiu verko studronda laboro, konstante kreskanta, tiel ke ĝi hodiaŭ etendiĝis al la plej grandaj urboj de Danlando.

En 1934 komenciĝis la kreado de “Feria Kolonio de Kosmos”, kiu kun sia ampleksa areo kaj siaj multaj domoj, parolad-salonego ktp. estas ŝatata kunvenejo en la hela somera tempo por la multaj amikoj de lia afero. La kolonio, kiu situas ĉe Nykøbing Sj. apud la bela golfo ĉe Nyrup estas en fizika materio malofta pruvo pri la volo al praktika amo, kiu estas la celo de la laboro de ĉi tiu viro, kaj estas lia forta deziro, ke ĝi en la venontaj jaroj fariĝu renkontejo por ĉiam kreskanta aro de spirite kaj tolereme pensantaj homoj de ĉiuj landoj, tiel ke ĉiu gasto de ĉi tie kunportu kun si kelkajn memorojn pri kunestado kun amaj kaj universale pensantaj homoj.

Trad. *Margrethe Noll.*

# Martinus 3

## La travivaĵo

de Erik Gerner Larsson



Ĉar la spirita travivaĵo aŭ iniciĝo, kiu estas la bazo de la tuta aperado de Martinus, estas tiel malofta kaj unika, ke ĝi nur havas similaĵojn en la historiaj raportaĵoj, mi ĉi tie provas doni mallongan priskribon de ĝi. En la printempo 1921, kiam Martinus estis ĉ. 30-jara, li estis en sia spirita evoluo atinginta krizan punkton. Profunde en lia menso novaj fortoj komencis moviĝi kaj stranga nekontenteco pri si mem pli kaj pli kaptis lin. Sen emo al edzeco kaj kreado de hejmo lia menso pleniĝis pri ĉiam kreskanta sopiro al tio, esti io por aliaj homoj, kaj neklaraj imagoj pri preparado por esti misiisto ĉe nekulturitaj gentoj okupis liajn pensojn. En sia celado al kompreno li iun tagon pruntis malgrandan teozofan libron de amiko. Dum la legado de ĝi liaj okuloj estis kaptataj de linio, en kiu staris, ke kiam oni serioze deziras koncentrigi siajn pensojn pri Dio, oni devas sidiĝi sur seĝon, eventuale kovri la okulojn per vualo kaj koncentrigi ĉiujn siajn pensojn al la Plejpotenculo. Li sentis inklinon provi ĉi tiun konsilon, kaj tiamaniere aperis la okazintaĵo, kiu en la daŭro de multaj tagnoktoj metamorfozis la junan viron de Vendsyssel (nord-judlando) de nekonata, silentema kaj aminda homo al portanto de la plej granda misio, kiu povas esti metata sur homajn ŝultrojn.

Li nur estis sidanta mallonge, kiam lia tuta persono subite estis envolvata en blindige blankan lumon; post tio

aperis la unua kosma travivaĵo, kiu metamorfozis lian konscion tiel plene, ke nur la esprimo “nova naskiĝo” klarigas tion, kio okazis.

De la stato esti homo, kiu nur estis konscia en la ekstera mondo, kiun ni ĉiuj konas, Martinus vekigis al stato de konscio, en kiu ĉiuj antaŭaj limoj cedis al klarvidado, kiu permesis al li travidi la tutan spiritan flankon de l' evoluo de la vivanta estaĵo tiel facile, kiel li antaŭe povis observi la nuran fizikan flankon. Kien ajn li rigardis en la mallumon, fariĝis lumo. Ĉie kaj en ĉio la kreitaĵoj senvualigis al li la ekziston de amega Dio. Malantaŭ ĉio la amo aperis, kaj en liaj sango kaj nervoj, en ĉio, kio estis li, estis fariĝinta fakto, ke lia vivo nun estas inaŭgurita al tio sola: pere de siaj novaj kapabloj demonstracii al ĉiu, kiu havas okulojn por vidi kaj orelojn por aŭdi, la ekziston de Dio, kies ĉirkaŭpreno li de la unua momento de sia kosma revekiĝo ĉiame sentis kaj sentas. Pri ĉi tiu misio la kreado de vere matematika mondanalizo, absolute neskiebla, spirita scienco, studebla por ĉiu objektive akceptebla kaj senantaŭjuĝa esploranto, temas ĉiuj miaj sekvantaj artikoloj, samtempe kiam mi esperas, ke ilia enhavo atingos ĝuste al tiuj, kiuj dank' al spirita matureco kaj vera sopiro al agnosko de la vero bezonas iliajn sciigojn.

*Trad. Margrethe Noll.*

IVO LAPENNA naskiĝis en Split (Dalmatio, Jugoslavio) la 5-an de novembro 1909. Li studis juron en Split kaj Zagreb, kaj en 1933 li doktoriĝis. Ekde la fino de 1949 Ivo Lapenna rezidis ekster Jugoslavio. Unue li estis en Parizo kaj ekde la mezo de 1951 en Londono, kie li poste fariĝis brita ŝtatano.

Lapenna estis kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo (poste Akademia Esperanto-Klubo) en la Universitato de Zagreb en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis aprilo 1941; prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937-1950; komitatano kaj estrarano de IEL (ekde 1947 UEA) de 1938-1974; ĝenerala sekretario de UEA de 1955-1964; prezidanto de UEA de 1964-1974; membro de la Akademio de Esperanto ekde 1952; kunfondinto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) en 1980 ekde tiam ĝia prezidanto; membro de la redakta komitato de la internacia kultura kaj informa revuo *Horizonto* kaj ĝia ĉefa kunlaboranto.

En 1977 li pensiĝis, kaj la 15-an de decembro 1987 li forpasis en Kopenhago, kie li estas entombigita en Rødovre Kirkegård. Ĉu ne estas pensige, ke Zamanhof naskiĝis ankaŭ la 15-an de decembro? – Oni povas detale legi pri la biografio de Ivo Lapenna (1909-1987) en *Horizonto* n-ro 6/1984. (Eldonanto Peter Zacho, 1911-1991).

Vi estas invitita senpage utiligi la abundan materialon de la Lapenna-hejmpaĝo: interesaj dokumentoj, bonaj paroladoj, historaj fotoj ktp. (bv. indiki la fonton). Jen la reta adreso: [www.ivolapenna.org](http://www.ivolapenna.org)

*Ole Therkelsen*



## INFORMO PRI LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo *Kosmos* estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

La frontpaĝa bildo: 90-jara Martinus  
© Mischa Lim, Kopenhago

Eldonanto: Martinus-Instituto

Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 38 34 62 80

fakso (+45) 38 34 61 80

Telefotempo:

lundu-ŝabudo 13-16

vendredo: 9-12

DK p.ĝiro 642-9580

UEA-kodo mins-d

[www.martinus.dk](http://www.martinus.dk)

[info@martinus.dk](mailto:info@martinus.dk)

[www.shop.martinus.dk](http://www.shop.martinus.dk)

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca),

Helen Claesson kaj Jonas Dalmose.

Kompostado: Vibeke Falk kaj Dan J. Elhaūge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj

Prezo en EU: DKK 70,00 aŭ EUR 9,40

Prezo ekster EU: DKK 56, EUR 7,50 aŭ USD 9,60

Unuopaj kajeroj: DKK 35,00

Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Idealfond 2009

Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

ISSN 1600 41 16.





# La Kosmologio de Martinus

## **Martinus estis dana verkisto (1890-1981)**

La kosmologio de Martinus estas spirita scienco. Ĝi priskribas la eternajn principojn, leĝojn kaj bazajn energiojn, kiuj fundamentas la spiritan kaj fizikan mondojn. Laŭ kosma konscio ĉio estas viva, eĉ de la atomo en mikrokosmo, de plantoj, bestoj kaj homoj en mezkosmo al galaksisistemoj en makrokosmo. La universo estas unueca organismo, viva estulo.

La mondo ĉiam evoluas. Por kompreni la evoluon de besto al homo oni bezonas la pensojn pri reenkarriĝo, sorto kaj karmo. La homaro nun spertas suferojn kaj mal-lumon. Iom post iom tio kaŭzas en ĉiu homo evoluon al logika pensmaniero, al pli humana sinteno kaj homama kapablo.

Tio estas la provizora celo de la evoluo. La plej gravan instruadon donas al ni la vivo mem. Ni ĉiuj estas naturaj membroj de tiu lernejo. Tial la kosmologio de Martinus ne havas iajn ajn membrecon, unuiĝon aŭ asocion. Sed ĝi celas doni al la unuopa homo komprenon pri la eternaj vivleĝoj, kaj helpi al ĉiu interesato fariĝi memstara kaj kapabla mem vivi homame, logike kaj tolereme.

Pro komenciĝanta amkapablo la homaro iam forlasos la bestoregnon kaj la mortigan principon kaj kreos internacian, pacan mondregnon.

Studado de la kosmologio donas al vi helan kaj optimisman vivkomprenon.



Esperanto-grupo en Klint 2009